

Terminara Kuirejo:




Karaj gekolegoj,

jam delonge sopirate, unuafoje la ampleksa laborrezulto de IFEF-Terminara Sekcio ekde apero de libroj „FERVOJA TERMINARO” en 2004 estas senpage rigardebla en Interreto. Tio servas precipe por verki fakartikolojn, prepari fakprelegojn, sed ankaŭ al ĉiuj ĉi-koncerne interesatoj. Per tiu plejmoderna kaj komforta alireblo, *UIC* honoras kaj subtenas nian volontecan laboron. La terminaro nun nomiĝas *RailLexic 4.0*, respondas al evoluigstato 30-a de Novembro 2015 kaj enhavas terminojn - parte kun notoj kaj difinoj - en 23 lingvoj, nome angla, araba, ĉeĥa, dana, Esperanto, franca, finna, franca, germana, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, rumana, rusa, serba, serbokroata, slovaka, sveda. Ĉi tie „serbokroata” estas nur la cirilalfabeta versio de latinalfabeta serba lingvo. Serbokroata lingvo ne plu ekzistas kiel oficiala. Oni ankoraŭ ne transprenis la veran kroatan lingvon - kiel ankaŭ estonan, mongolan, slovenan kaj turkan lingvojn el la interna terminarversio *UIC TermEdit*.

Heinz Hoffmann

UIC-terminaro rete atingebla



Serĉi en la reta terminaro:

Tie ĉi franca/hungara/rumana traduko de la nocio „manovrad-signalilo kun absoluta haltindiko” (surfacingvo franca)

Por aliri kaj apliki *UIC RailLexic 4.0* necesas havigi la koncernan retadreson, la uzanto-nomon kaj la pasvorton. Petu tiujn informojn ĉe la gvidanto de la faka komisiono de IFEF Jan Uldal Niemann (niemann@kabelmail.dk). Ni koncize priskribu la procedon: Post enigo de la retadreso en vian retesplorilon tie aperas fenestro kun eblo elekti tielnomantan surfacingvongon laŭ flago angla, franca, germana. Enskribu uzantonomon (*User / Nom d'utilisateur / Benutzername*) kaj pasvorton (*Password / Mot de passe / Passwort*) en la montritajn poziciojn. Post alklako de *LOGIN* aŭ *CONNEXION* aperas granda fenestro kun elekto de fontlingvo (*Source language / Langue source / Ausgangssprache*) kaj de 3 cellingvoj (*Target languages / Langues cibles / Zielsprachen*) samtempe montrataj. Supre maldekstre enigu serĉatan terminon en la fontlingvo kaj alklaku la luepo-simbolon. Sur la meza areo sub koncerna fako aperas la maldekstre elektita termino, eventuale kun noto (*Note / Commentaire / Anmerkung*) kaj difino (*Definition / Définition / Definition*) en la fontlingvo kaj en ĉiuj 3 cellingvoj.

Ekzemple vi serĉu ĉiujn Esperanto-terminojn komenciĝantajn per „manovrad-”. Elektitaj estas surfacingvo franca, fontolingvo Esperanto kaj cellingvoj franca, hungara, rumana. Post enigo de

„manovrad“ kaj alklako de lupeo-simbolo aperas la dezirata listo kun aktiva unua termino. Se oni deziras tradukojn de alia termino, necesas alklaki por aktivigi tiun. Supre vi vidas la terminarpaĝon ĉe „manovrad“ signalilo kun absoluta haltindiko“. La grasa vorto en la surfacingvo (ĉi tie **Signaux**) indikas la konceran fakon. Bedaŭrinde laŭ spertoj la indikita fako ofte ne ekzakte trafas la nocion kaj ties difinon.

En dua ekzemplo estas serĉataj tradukoj de la ĉeĥa termino širá trať. Elektitaj estas surfacingvo germana, fontolingvo ĉeĥa kaj cellingvoj Esperanto, dana, itala. Post enigo de šira trať (funkcias ankaŭ sen supersignoj) kaj alklako de de lupeo-simbolo aperas la dezirata termino jam aktiva kun tradukoj laŭ jena terminarpaĝo: Ĉe EO post Anmerkung la vorto „fervojlino“ anstataŭas pli longan terminon „fervojlina sekcio eksterstacia“.




La sekva noto pri difindeveno nur estas enigita, se la difino ne devenas de laborlingvo angla, franca aŭ germana. Ĉar ŝlosilnumeroj ne plu aperas en RailLexic, en sekva aktualigo anstataŭos ĝin la termino širá trať.


Ĉe CS la termino volná trať estas sinonimo al širá trať. Ĉe IT la termino tronco aperto kun indiko Schweiz estas esprimo en svis-itala lingvo.

Kaj ankaŭ ĉi-foje denove: Novaj taskoj – novaj taskoj – novaj taskoj

La teksto ĉi-foje koncernas detalojn pri trakforkoj kaj trakokrucaĵoj.




bildo 1: simpla frogo kurba



bildo 2: duobla frogo

14834 (bildo 1)



Akuta angulo formata de intersekcio de ambaŭtrakaj ruliĝejoj, mezurata ĉe la intersekcio

dana	<i>hjertespidsvinkel</i>	hungara	<i>keresztelési szög</i>
franca	<i>angle de croisement</i>	pola	<i>kąt dziobnicy</i>
germana	<i>Herzstückspitzenwinkel</i>	Esperanto	<i>frogopinta angulo</i>
		ĝis nun	

Terminproponoj:

- 1) frogopinta angulo [kiel ĝis nun]
- 2) pintoangulo de frogo [por pli adapti al 00318 / 00319]

Komento

La angulo troviĝas kaj en simpla frogo laŭ bildo 1 kiel nedifinita nocio 00318 „pintoangulo de simpla frogo“ kaj en duobla frogo laŭ bildo 2 kiel nedifinita nocio 00322 „pintoangulo de duobla frogo“.

00319

La nedefinita nocio koncernas laŭ literaturo tiun angulon, kiu rilatas al fino de trakforko aŭ trakokrucaĵo.



ĉeĥa	<i>úhel odbočeni</i>	itala	<i>angolo di deviazione</i>
dana	<i>sporskiftevinkel</i>	kroata	<i>kut skretanja</i>
franca	<i>angle de déviation</i>	pola	<i>skos</i>
germana	<i>Weichenwinkel</i>	rumana	<i>unghi de mediere</i>
hungara	<i>kitérő eltérítési szöge</i>	slovena	<i>odklonski kot kretnice</i>
		Esperanto	<i>angulo devia</i>
		ĝis nun	<i>(trakforko)</i>

Terminproponoj:

- 1) trak-disetenda angulo
- 2) trak-disforkiĝa angulo

Komento

Ĉe rekta simpla frogo anguloj 00318 kaj 00319 estas samaj. Pro tio en bildo 1 estas desegnita simpla frogo kurba. Tiukaze angulo 00319 estas iomete pli granda ol angulo 00318.

PIV: disetendi


Disigante direkti ien, formante ĝin rektolinia

disforkiĝi

Ĉe iu loko dividiĝi kaj plui en du aŭ pluraj direktoj

14835 (bildo 1)

Distanco inter la ruliĝeĝoj en ties alteco ĉe punkto de frogo malplej proksima de ties pinto.



dana	<i>spredmål mellem hjertespidsskinner</i>	hungara	<i>keresztelési csúcs tágassága</i>
franca	<i>ouverture en sortie de cœur</i>	pola	<i>rozstaw szyn dziobowych</i>
germana	<i>Spreizmaß des Herzstücks</i>	Esperanto	<i>disetenda mezuro ĉe frogo</i>
		ĝis nun	

Terminproponoj:

- 1) frogalkana larĝo
- 2) frogofina larĝo


} [laŭ elekto 08290 en TeKu 152]

bildo 3:

nadlorela
fiksrelo

14836 (bildo 1)


Distanco inter la ruliĝeĝoj en ties alteco ĉe komenco de frogalo.



dana	<i>spredmål mellem vingeskinner</i>	hungara	<i>villasínek tágassága</i>
franca	<i>ouverture en entrée de cœur</i>	pola	<i>rozstaw szyn skrzydłowych</i>
germana	<i>Spreizmaß der Flügelschienen</i>	Esperanto	<i>disetenda mezuro ĉe frogaloj</i>
		ĝis nun	

Terminproponoj:

- 1) frogalkomenca breĉodistanco
- 2) frogalpar-komenca breĉodistanco

05940 (bildoj 1, 2)**Distanco inter gvideĝo de frogalo aŭ kontraŭrelo kaj ties apartenanta ruliĝeĝo.**

ĉeĥa	<i>žlabek pro okolek</i>	kroata	<i>kolotečina</i>
dana	<i>sporrille</i>	pola	<i>żłobek</i>
franca	<i>ornièrè</i>	rumana	<i>sină cu făgaş de ghidare</i>
germana	<i>Rillenweite</i>	slovena	<i>žleb med ostrico in osnovno tirnico</i>
hungara	<i>nyomcsatorna</i>	Esperanto	<i>relkanelo radflanĝa (ĉe trakokrucaĵo)</i>
itala	<i>intervallo di passaggio guidato</i>	ĝis nun	

Terminproponoj:

- 1) frogala/kontraŭrela breĉodistanco
- 2) froga breĉodistanco

05941 (bildo 3)**Ĉe relkomutil-duono la plej mallarĝa distanco inter oscedanta nadlorelo kaj ties apartenanta ruliĝeĝo de fiksrelo.**

ĉeĥa	<i>výhybkový žlabek pro okolek</i>	itala	<i>intervallo di libero passaggio degli aghi</i>
dana	<i>sporrille mellem åben tunge ok sideskinne</i>	kroata	<i>kolotečina između prijevodnice i nalježne tračnice</i>
franca	<i>ornièrè de libre passage</i>	pola	<i>odstęp między iglicą a opornicą</i>
germana	<i>Zungendurchfahrtrille</i>	rumana	<i>făgaş de trecere liberă</i>
hungara	<i>nyomváltó</i>	slovena	<i>odmik ostrice</i>
		Esperanto	<i>disetenda mezuro ĉe nadlorelo</i>
		ĝis nun	<i>pinto</i>

Terminproponoj:

- 1) nadlorela breĉodistanco
- 2) relkomutila breĉodistanco

Rimarkigo pri 06109 en TeKu 152

Pri nocio 06109 ĝis nun plej multaj kontribuantoj preferis solvon 1) "trafikdivido". Tiu ĝenerala esprimo povas ankaŭ koncerni dividon inter pluraj trajnkursoj aŭ trajnkategorioj, sed laŭ la difino temas pri divido inter diversaj transportsistemoj (fervojo, ŝoseo, rivero). Internacie estas ĉefe uzata la angladevena esprimo "Modal Split". Denova pripensado estas rekomendata.

Peto:

Kiu volas kontribui per elekto aŭ nova propono, kaj ne partoprenos IFEF-kongreson en Varna, sendu sian preferon ĝis 15-a de Majo al la sekretario de Terminara Sekcio.

Faka Komisiono de IFEF:

Gvidanto: Jan Uldal Niemann
 Adreso: Hovedvagtstræde 9E, 1
 DK-3000 Helsingør
 Telefono: +045 71 70 63 83
 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Terminara Sekcio:

Sekretario: D-ro Heinz Hoffmann
 Adreso: Finstere Gasse 2
 DE-01445 Radebeul
 Telefono: +049 351 83 85 877
 Retadreso: hoffmann-ifef@kabelmail.de